



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Legu kaj abonu
la revuon por
lernantoj kaj
komencantoj
LA JUNA AMIKO

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pichel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 6/1974 - 8 feb 1974
Aperas ĉiusemajne

Gravaj ekkontaktoj

Okaze de la "Aŭstralia Tago" en Vieno, en la palaco Pallavicini, la 28an de januaro estis invitita la diplomataro. Inter la aliaj gastoj troviĝis kiel reprezentanto de la "Societo por Internacia Kontakto - Esperantoamiko" ties vicprezidanto, s-ano Emil Vokal.

Prezentiĝis al li oportunoj paroli kun diversaj diplomatoj pri Esperanto. Ekzemple kun la papa nuncio Giulio Rossi pri Esperanto kiel liturgia lingvo.

Kun la ĉina diplomato pri apliko de Esperanto per la gazeto "El Popola Ĉinio". La japana diplomato sugestis kontakton kun sia ambasado en Vieno.

Oficisto de UNIDO montris grandan intereson por Esperanto kaj peris kontaktojn.

La aŭstria ministro por eksteraj aferoj, d-ro Kirchschräger, vigle interesiĝis pri la Esperantlingvaj elsendoj, sur mallongondo, de Radio Vieno, traktantaj politikajn kaj kulturajn okazaĵojn en Aŭstrio.

La skriba saluto, kiun sendis la Aŭstralia Esperanto-Kongreso, kunveninta dum januaro en Brisbane, vekis la atenton de la Aŭstralia gazetara ataŝeo E. Sheil kaj de aliaj diplomataj personecoj.

La supran raporton de Emil Vokal Radio Vieno elsendos sur mallongondo 49 m la 9an de februaro, je la 17,45 h (ripeto la 10.2. je 06,45 h).

Japanio kaj la mondo

Nürnberg (pp) "Japanio kaj la mondo - kultura dialogo kaj spiritaj tradicioj" estos la temo de prelego de Michael Zeilinger, Fürth, dum la jam anoncita Esperanto-kunveno en Nürnberg, la 17an de marto 1974, en Meistersingerhalle, konferencĉambro 2. La prelego okazos je la 3a horo posttagmeze. Ekde la 11 horo estos okazo informiĝi pri Esperanto kaj aĉeti Esperanto-librojn. Ĉiuj esperantistoj estas kore invititaj! Informojn donas: Esperanto, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, Tel. 463649

"Esperanto en Bavario" neformala bulteno por esperantistoj en Bavario estis dissenditaj al 400 esperantistoj en Bavario en 126 lokoj.

UEA-jarlibro 1973, dua parto

Rotterdam (op) Aperis fine la dua parto de la Jarlibro de UEA 1973 kun la jenaj raportoj 1972 kaj ampleksa, ilustrita libro-listo.

La Estrara Raporto sub VIII. Informado mencias ankaŭ la inform-servon Pilo-Press per jenaj vortoj: "La Kunlaboranto de la Konstanta Komisiono, Ludwig Pickel, pere de sia eldonaĵo Pilo-Press laboris ĝis februaro 1973, kiam pro malsano li devis provizore ĉe-sigi la laboron. Dum certa tempo Pola Radio havis specialan rubrikon Novaĵoj de Pilo-Press, kiuj tiamaniere fulmrapide atingis antaŭaŭ pli vastan publikon. Multaj gazetartikoloj pruvas, ke la servo estis vaste utiligata, en Pollando grandskale eĉ de profesiaj ĵurnalistoj."

Gustigo de PEA

Nürnberg (pp) Pilo-Press ricevis de la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, Stanisław Swistak, Varsovio, jenan leteron de la 30.1.74:

"Lige kun la informo pri "Ĉu vi parolas Esperante?", aperigita en "Pilo-Press" n-ro 4/1974, ni deziras ĝustigi, ke ĝis nun ĝi aperis sume en la kvanto de 45 000 ekz. Nome 5 000 ekz. en 1969 j., 10 000 ekz. en 1970 j., 10 000 ekz. en 1972 j. kaj 20 000 ekz. en 1973 j. / en decembro/. La lasta IV eldono de ĉi tiu lernolibro nun estas finbindata kaj oni transdonos ĝin por vendado en la komenco de februaro 1974.

Eluzante la okazon ni informas vin, ke de la 17-a ĝis la 24-a de februaro 1974 red. A. Pettyn gvidos intensan kurson de Esperanto por komencantoj en Cottbus en Germana Demokratia Respubliko. Li instruos tie laŭ la invito de Germana Kulturligo en GDR kaj Centra Laborrondo Esperanto. La kurson partoprenos 20 personoj, plejparte estontaj kursgvidantoj en Cottbus."

Unua esperantista Ski-semajno en Jugoslavio

Maribor (mĝ) Inter la 9 kaj 16 feb 1974 okazos en hotelo "Bellevue" sur Pohorje apud Maribor la 15a Internacia Fervoĵista Ski-Semajno (IFES), la unua kiu okazas en Jugoslavio. La organizanto estas Fervoĵista E.Societo Maribor, adreso por aliĝoj: Jovan Mirković, Filipičeva 21, YU-62000 Maribor. Oni esperas pri 60 partoprenantoj el pli ol 7 landoj.

Solida financa garantio

Hamburg(ok) LKK de la 59a Universala Esperanto-Kongreso kun granda kontento anoncas, ke la Garantia Kapitalo (por kovri eventualan deficiton) jam superis la fiksitan sumon de 5.000 guld. Germanaj esperantistoj inter si kolektis en nur kelkaj monatoj sumon de pli ol 7.000 GM. Lkk deziras publike danki per ĉi tiu sciigo ĉiujn kontribuintojn.

Kritika voĉo el Britio

S-ino Helga Rapley, Ilford, skribas: "Mi ne reabonas viajn aferojn ĉar ili ne alvenas kiam oni deziras ilin: Pilo-Press devus aperi ĉiusemajne: mi ricevas 4 numerojn kune unfoje en monato kaj ĝia enhavo certe ne valoras la ege altan prezon. Mi ricevas Heroldo por malpli kaj ĝi enhavas multe pli da ĝeneralaj novaĵoj. Vi daŭre presas laŭdajn menciojn pri Pilo Press, ĉu vi kuraĝas presi mian opinion?"

Wir sprachen mit



Reinhard Hauptenthal

Lehrbeauftragter für Esperantologie an der Universität Saarbrücken. Schriftleiter der Esperanto-Enzyklopädie für die Abteilung Literatur und Sprache, diplomierter Esperanto-Sprachlehrer für den höheren Dienst (Dipl. S.I.E.) Schriftleiter der Internacia Pedagogia Revuo und schließlich noch Schriftführer des Saarländischen Esperanto-Bundes. Das sind ein Großteil der Funktionen, die der in Dudweiler-Süd wohnhafte Studienrat Hauptenthal erfüllt. Er ist heute einer der bedeutendsten Esperanto-Spezialisten mit weltweiten Verbindungen.

Zahlreich sind bereits seine Veröffentlichungen, die allein im Dezennium von 1962-1972 - 234 Titel betragen und in einer Personalbibliographie in der Schweiz erfaßt sind. Die wichtigste Veröffentlichung im vergangenen Jahr war ein vielbeachteter Beitrag in der Zeitschrift für Literaturwissenschaft und Linguistik zur Problematik der Lernziel fixierung im Literaturunterricht, eine Arbeit, die nun auch in Esperanto-Übersetzung vorliegt. Vier wichtige Beiträge zur Interlinguistik sind für dieses Jahr angekündigt.

In Oberfranken, in der Geburtsstadt Lukas Kranachs, d. Ä., wurde Reinhard Hauptenthal im Februar 1945 geboren, Kindheit und Jugendjahre mit Volksschule und Gymnasium verlebte er in Sulzbach. Für sein gutes Abiturrexamen erhielt er den Scheffelpreis des Volksbun-

des für Dichtung in Karlsruhe. An unserer Landesuniversität studierte er Germanistik, katholische Theologie, Philosophie, Pädagogik und Geschichte.

Reinhard Hauptenthal weist auf die leichte Erlernbarkeit des Esperanto hin, dessen Hauptmerkmale Einfachheit der Grammatik und des Wortschatzes seien. Die meisten Wortwurzeln stammten aus romanischen Sprachen, der Wortton liege immer auf der vorletzten Silbe. Gegenwärtig sprechen etwa 15 Millionen Menschen auf der Erde Esperanto. Die Sprache bedeute eine wesentliche Bewußtseinsweiterung. Die Literatur werde zumeist von Einheimischen, die die Gefühlswerte ihrer Muttersprache kennen, unmittelbar in Esperanto übersetzt. Dadurch sei ein tiefes Eindringen in Volkstum und Mentalität von Landschaft und Volk möglich. Er selbst werde sich mit diesem Fragenkomplex noch eingehend befassen.

"Ni parolis kun

Reinhard Hauptenthal"

Pli kaj pli ofte aperas en germanaj gazetoj artikoloj pri esperantistoj, en rubrikoj tre popularaj kaj ŝatataj de la legantoj. Jam kelkfoje Pilo-Press povis raportii pri tiaj artikoloj.

Hodiaŭ ni prezentas eltranĉaĵon el la gazeto "Dudweiler im Spiegel", n-ro 212 de la 24a de januaro 1974, kiu informas pri Reinhard Hauptenthal, konata esperantologo kaj instru-komisiito pri Esperanto ĉe la universitato Saarbrücken. (vidu maldekstre!)

Atentigo de la LKK Hamburg

La kongresanoj estas varme petataj ne skribi jam nun al la adresoj de la Kongreso, nek al la urba turisma oficejo de Hamburgo, pri mendo de hoteloj. Tiaj petoj nur sennecese laborigas la organizantojn. Ĉiu aliĝinto ricevos fine de februaro aŭ komence de marto, kune kun la Oficiala Dua Bulteno, hotelmendilon. Ĉiu, kiu mendos tiunmaniere, ricevos post nelonge la konfirmilon pri la menditaj litoj.

Ĉiu aliĝinto ricevis konfirmilon pri la aliĝo al la kongreso kun la kongresa numero. La Kongresan Karton oni ricevos en Hamburgo kune kun la aliaj kongresaj dokumentoj.

Poŝtaj rekordoj kaj malrekordoj

Dum la lasta tempo oni povis konstati, ke la poŝta komunikado inter Pollando kaj FRG pliboniĝis. En rekorda tempo alvenis letero el Varsovio, stampita la 4 feb 1974, en Nürnberg jam la 6 feb 1974 antaŭtagmeze.

Malrekordojn oni povas indiki pri la itala poŝto: Presaĵo kun la radio-programo de Romo stampita la 23.11.73, alvenis en Nürnberg la 19.1.74; la oktobra numero de la itala l'esperanto en koverto stampita la 6 okt 73 alvenis nur fine de januaro 1974. Ankaŭ standardaj presaĵoj de Radio Romo kun informoj alvenas nur post 4 semajnoj.

Atentigo Al ĉi tiu numero de PP estas aldonita oficiala aliĝilo al la Postkongreso de Esperanto en Kronach, FR Germanio de 4 - 10 aŭgusto. Bonyolu multnombre aliĝi al tiu Esperanto-aranĝo en Norda Bavario.

Pilo-Press Eldonanto kaj redaktoro Ludvig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113
Jara abono 30,- GM

Unua Konkurso de la Pola Radio en 1974

- 10-taga ekskurso tra Pollando
 - multaj premioj kaj memordonacoj
- en enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la jenaj demandoj:

1. Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?
2. Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la eŭropaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?
3. Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro — februaro 1974, laŭ via opinio, plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio, PL-00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando — en kovertoj signitaj per la devizo: „Konkurso”, ĝis la 15a de marto 1974 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en niaj disaŭdigoj la 16an de aprilo 1974. La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn. Ni deziras al vi bonŝancon!

Pola Radio

La gastmikrofono de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio atendas la 17-an laŭreaton!

Aŭskultado al la Esperanto-elsendoj plifaciligas la respondadon al la supraĵ demandoj.

Radio Varsovio ĉiutage disaŭdigas en la internacia lingvo du programojn:

6,00 h - ondolongoj 41 m, 49 m, 200 m
16,30 h - ondolongoj 31 m, 41 m